# PLEJ RARA TREZORO

**Teksto: Anja Karkiainen**
**Muziko: Vesa Pölkki**

**Lanta valso**




© 2000 Vesa Pölkki & Anja Karkiainen


ne por min re - gi. A - po - gi vi ce - las, kon - so - li kaj fle - gi. Se
ki - am mi la - cas, sed vi min for - la - si ne - ni - am mi - na - cas. Vi
e - le la nu - boj, mi ser - ĉas jam ŝir - mon pro ti - mo kaj du - boj. Sed
27
ta - men mi fo - je so - le - con so - pi - ras, tuj tu - te li - be - ra mi
hel - pas al mi en mal - pu - ro kaj du - ro per vi - a sen - fi - na hu -
vi ne he - zi - tas, eĉ ne por mo - men - to. Ja i - lin for - blo - vos la
33
i - ras. Pro tro - a zorg - em - o vi ad - e ad - mo - nas, vi
mu - ro. Se mi sen - pri - pen - se tro mul - ton a - vi - das, vi
ven - to! De - kli - vo grim - pa - ta kru - te - gas kaj al - tas, an -
39
lu - das, pe - to - las, sed vi ne fri - po - nas. Vi ne fan - fa - ro - nas, ne
ŝer - ce min mo - kas, per ti - o min bri - das. Gas - ta - me di - vi - das vi
he - le ni spi - ras, sen - for - taj ni hal - tas. Vi, mem el - ĉer - pi - ta, in -
45


1.,2.
blu - fas, ne bla - gas, sed ki - am be - zo - ne, vi a - gas. A -
ki - on vi ha - vas - ĉu mi re - cip - ro - kas, ne gra - vas! A -
sti - gas: "Pen - int - o ni ĝu - os vid - aĵ - on sur - pin - te!"
51
D.S. al Coda
Coda
3.
A - je.
57
63

**PLEJ RARA TREZORO**

Dediĉita al Odd Tangerud,
sindona kunvaganto sur Parnasaj padoj.

Amiko fidela, amiko sincera
plej rara trezoro dum viv' efemera
Se vin rajtas mi akompani survoje
mi iras kuraĝe kaj ĝoje.

Vi tenas la manon sed ne por min regi,
apogi vi celas, konsoli kaj flegi.
Se tamen mi foje solecon sopiras,
tuj tute libera mi iras.

Pro troa zorgemo vi ade admonas,
vi ludas, petolas, sed vi ne friponas.
Vi ne fanfaronas, ne blufas, ne blagas,
sed kiam bezone, vi agas.

Amiko fidela, amiko sincera
plej rara trezoro dum viv' efemera
Se vin rajtas mi akompani survoje
mi iras kuraĝe kaj ĝoje.

Kapricas kaj plendas mi, kiam mi lacas,
sed vi min forlasi neniam minacas.
Vi helpas al mi en malpuro kaj duro
per via senfina humuro.

Se mi senpripense tro multon avidas
vi ŝerce min mokas, per tio min bridas.
Gastame dividas vi kion vi havas,
ĉu mi reciprokas, ne gravas!

Amiko fidela, amiko sincera
plej rara trezoro dum viv' efemera
Se vin rajtas mi akompani survoje
mi iras kuraĝe kaj ĝoje.

Dum nigraj ruliĝas ĉiele la nuboj,
mi serĉas jam ŝirmon pro timo kaj duboj.
Sed vi ne hezitas, eĉ ne por momento.
Ja ilin forblovos la vento!

Deklivo grimpata krutegas kaj altas,
anhele ni spiras, senfortaj ni haltas.
Vi, mem elĉerpita, instigas: 'Persiston!
De l' pinto ni vidos en diston.'

Amiko fidela, amiko sincera
plej rara trezoro dum viv' efemera
Se vin rajtas mi akompani survoje
mi iras kuraĝe kaj ĝoje.